


PSI 2021 en Braunschweig kaj la korona viruso

Jes ni povas
(verŝajne)



Pri PSI (Printempa Semajno Internacia), planita por Braunschweig en 2021, ni jam raportis en *Esperanto aktuell* 05/2020. Ni – la PSI-teamo – opinias, ke ĉi-tiu PSI povos okazi, ĉar ni povis interkonsenti pri taŭgaj kondiĉoj kun la junulargastejo en Braunschweig.

Ni tre ĝojus, se vi ĉeestis. Sed ni urĝe bezonas vian helpon: bonvolu aliĝi baldaŭ, sed laŭeble antaŭ la jarfino. La plej rapida maniero fari tion estas per <https://psi.esperanto.de/#alighi>. Se vi volas scii kial, nur daŭrigu legi.

La prepara kunveno por la PSI 2021 en Braunschweig okazis je la fino de septembro. Ni trovis tre modernan kaj belan domon en alloga urbokernproksima loko, kiun ni okupos solaj.

La Korona problemo estis diskutita detale en la teamo: decido – ni planas kvazaŭ la situacio ne ŝanĝiĝos ĝis Pasko 2021. Ĉi tiu temo ankaŭ estis diskutita kun la junulargastejo. Rezulto: La domo estas sufiĉe granda, por ke ni povu okupi ĉambrojn kaj seminariejojn konforme al la nunaj protektaj reguloj. Do ni opinias, ke PSI estas farebla en Braunschweig.

Intertempe ni povis interkonsenti kun la junulargastejo, ke ni povas sole uzi la tutan domon jam kun 80 partoprenantoj – la domo entute havas 168 litojn en 44 ĉambroj. Tiam estos neniu aliaj gastoj en la domo – tio faciligas al ni laŭeble plej bone plenumi la koronajn regulojn (distanco, higieno, spirmasko, ventolado). Ni ankaŭ povas okupi la ĉambrojn kun homoj el maksimume 2 hejmoj. Krome ni povis ŝanĝi la nuligajn kondiĉojn tiel, ke la okupokontrakto povas esti nuligita ĝis la fino de februaro 2021 (se la korona situacio tiam ne permesos, ke PSI 2021 okazu).

Ĉiukaze: se DEB devos nuligi la eventon pro koronaj kialoj, estos neniuaj kostoj por jam registritaj partoprenantoj, ĉiuj pagitaj sumoj estos tute repagitaj.

Tamen ni nepre bezonas vian helpon, por ke restu la ŝanco, ke PSI okazu en 2021. Kiel vi povas helpi? Aliĝu baldaŭ (vidu <https://psi.esperanto.de/#alighi>). Kial? Se ne sufiĉe multaj partoprenantoj frue registriĝos, GEA mem nuligos PSI 2021 en Braunschweig, por eviti pli da eventuale vanaj kostoj pro la prepara laboro.

La partoprenantoj, kiuj jam aliĝis al PSI 2021, povas esti rigardataj ĉiutempe per <https://psi.esperanto.de/2021/list/>.

Ni volonte revidos kiel eble plej multajn el vi en Braunschweig, kaj ni deziras al vi, ke vi restu sanaj.

ALIĜU - ALIĜU - ALIĜU!!!

Amike

La PSI-Teamo

psi@esperanto.de

<https://psi.esperanto.de/teamo>

